



# PENSEO

*N-ro 213*

*jul. / 2009*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Ŝanco

Gao Haitao

Ar profunde dormis en sia propra luksa litĉambro. Li nun povas vivi kvazaŭ en paradizo, ĝuste ĉar li estas milionulo, kiu posedas tiel multe da riĉaĵo, pro tio, ke li neniam forlasas ĉiun ajn ŝancon.

Noktmeze, li vekiĝis de stranga sono, kiu verŝajne venis el la studejo. Li tuj ellitiĝis, kaj pere de la fendeto inter pordo kaj kadro, rigardis eksteren sekrete.

En mallumo fulmis fasko da blanka lumo, ŝajne el elektra torĉo. En lia zorgema pririgardo aperis homa figuro, kiu malfermis murŝrankon kaj pririgardis la tirkestojn de la tablo. En tiu tempo, tiu, kiu faras tion, certe estas neniu alia ol ŝtelisto.

Li deprenis la ĉaspafilon de la muro kaj levis ĝin. Subite li puŝmalfermis la pordon, ŝaltis la lampon, eligis ekkrion — ĉiuj movoj okazis preskaŭ en la sama momento.

“Kiu? Ne moviĝu, alie mi pafmortigos vin!”

En la helbrila ĉambro, li vidis ĉifonitan viron kun velkĝinte malgrasa mieno, kiu konfuzite levis alten siajn manojn, petante, “Bonvole ne pafu. Mi kapitulacas!”

“De kie vi eniris?”

“Mi perforte malfermis tiun fenestron.”

Peco da vitro batrompiĝis. Ŝajnis, ke li deprenis ŝlosilon tie.

“Kiu vi estas? Kion vi faras?”

“Mi estas ŝtelisto. Pardonu min! Mi ankoraŭ ne sukcesis ŝteli ion. Se vi min kredas,

kontrolu min.”

“Ne, tio estas nepardonebla. Oni devas akiri monon per sia diligenta laboro. La penso pri senlabora rikoltado estas malestiminda. Tial, mi plej malŝatas impostojn kaj ŝtelistojn. Mi volas transdoni vin al la polico.”

Singardeme prenante la pafilon, li etendis sian liberan manon al la telefono. En lia vido, la ŝtelisto, kun kompatinda mieno, pene petegis, genuante sur la planko.

“Aĥ, aĥ, bonvole pardonu min ĉifoje!”

“Neniel! Ulaĉo kiel vi tute devas enprizoniĝi unu fojon!”

“Fak...te, ĝis nun mi jam enprizoniĝis kelkajn fojojn. Se mi denove estos sendita en prizonon, tio estos krimo plus krimo. Mi timas, ke estas tre malfacile por mi elprizoniĝi. Poste, mi certe ŝangos kaj reformos min, por ke mi ne plu faru malbonojn kaj fariĝu utila homo. Bonvole pardonu min!”

“Ke vi estu utila homo, tio estas bona!”

“Se vi pardonas min, mi faru kion ajn vi volus!”

La ŝtelisto koutouis senĉese por peti pardonon. Post iom da pripensado, Ar pridemandis, “Ĉu vi povas fari kion ajn?”

“Certe. Kion ajn vi ordonos. Bonvole diru al mi.”

“Tie, vi malfermu la monŝrankon tie.”

Montrante la grandan monŝrankon ĉe la angulo de la ĉambro, Ar serioze eligis tiun frazon. Ekrigardinte ĝin, la ŝtelisto skuis sian kapon embarasite.

“Tio... ne eblas. Tion mi ne faris. Precipe mi ne scipovas, kiel ĝustigi la kodon. Se vi volas ripari ĝin, bonvole venigu ripariston. Mi ne taŭgas por tio.”

“Vi tre taŭgas! Mi diru al vi la kodon kaj la metodon de malfermado.”

“Sed... kial lasu min fari tion, mi ne komprenas.”

“Ne parolu pri kompreno aŭ nekomprene. Faru laŭ mia ordono. Kompreneble, ankaŭ mi konsentas, se vi ne volas fari. Surloke mi pafrompos al vi la kruron, kaj poste mi alvokos policon. Kiel pri tio?”

“Mi komprenas, mi obeas. Sed, mi ĉiam sentas, ke la etoso estas iom stranga...”

Grumble murmurante, la ŝtelisto, laŭ instrukcio de Ar, ĝustigis la kodon, kaj je lia ektiro, malrapide malfermiĝis la pordo de la monŝranko, kie amasiĝis multaj paperaj pakaĵoj. Ar donis la jenan ordonon: “Malvolvu unu pakaĵon por rigardi!”

“Jes. Ah, ĉu ĝi ne estas stako da monbiletoj?”

“Nun mi donacu al vi unu monbileton el ĝi. Prenu ĝin.”

“Ĉu mi kredas miajn orelojn?”

“Estu senceremonia. Uzu ĝin kiel vojaĝpagon, kaj rapide foriru, ju pli foren, des pli bone. Sed ne plu promenu ĉirkaŭ ĉi tiu loko!”

La ŝtelisto montris nekredeble panikemon.

“Kiel bonkora vi estas! Vi ne nur donas al mi pardonon, sed ankaŭ vojaĝpagon...”

“Ne babilaĉu! Tuj for!”

La ŝtelisto senzorge kaj senĝene elkuris el la fenestro. Post nelonge, Ar translokis la enhavon de la monŝranko sur la tegmenton, metis la ĉaspafilon al la antaŭa loko, ŝirrompis la draton de telefono, kaj rapidis al la publika telefono, per kiu li alvokis la policon.

“Ĵus mia domo estas ŝtelita. Pro minaco de armilo de krimulo, mi diris al li la metodon malfermi la monŝrankon...”

Post nelonge li faris detalan priskribon al la alveninta policano.

“La fingrospuro, mi pensas, ne eblas malaperi. Ĉio restas kiel antaŭe, kiel vi vidas. La mono, kiun mi reprenis el la banko hodiaŭ,

estas tute ŝtelita.”

“Ŝajnas, ke la perdo estas tre granda. Tre bedaŭrinde!”

Vidante, ke la policano montras simpatian, Ar sagace diris, “Tamen... je via oportuno, mi volas ricevi atestilon pri ŝteliteco. Mi aŭdis, ke ĝi estas necesa por redukti imposton...”

elĉinigi **Hongjia**

## Ĉineske

**Cindy Mckee (Usono)**

### Kiu viktimo?

—laŭ ĉinesko Dingfengbo\*

vi venas sen pasporto  
nevivpova aborto  
de patrujo forvelka  
kelka  
Nenombrita eksporto

ĉi tie nur ĝenkventa  
vanta  
kiel subŝua cimo  
amaso da malhomo  
Nomo—  
alia krom viktimo

\**Dingfengbo (subigo de ŝtormo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7 / 7,2;7;2;7 laŭ rimaranĝo aabba / ccdeed*

## Dankon!

—laŭ ĉinesko Chaozhongcuo\*

sekfluis puna vundo  
sekco en grundo  
mi estis dezerto  
Okazis inundo

pluvo nutris  
min kurace  
amabundo  
via vivigis min

### Dankon pro fekundo

\*Chaozhongcuo (pedanta klerulo): ĉina fiksfoma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7, 5,66/444,66 laŭ rimaranĝo a,a,xa/xxa,xa (x=senrima)

## Al Jakvo

(al mia kunbatalanto, kiu estimas la ĉineskon)

—laŭ ĉinesko Wanghaichao\*

Griza knabo  
revante en  
via Antverpeno  
Elpaŝas vi  
interŝanĝas  
revojn por agpeno  
en mondareno  
Nehaltigebla  
fenomeno  
malgraŭ batoj  
kaj malica veneno

Flandra indiĝeno  
inda flamulo  
SAT-gangreno  
vi batalas  
ĝin bruligas  
ĝis nulaparteno  
ĉe virtkunveno  
Proletfleg-penso  
daŭra treno  
tra kapo kaj  
fajro en abdomeno

\*Wanghaichao (rigardo al martajdo) : ĉina fiksfoma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446,446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj laŭ rimranĝo xxa,xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x=senrima)

## Hundo sur ĉeno

—laŭ ĉinesko Huanxisha\*

Vi palpas ĝin viscere  
vualas vin ekstere  
Li vundus vin severe  
  
se penso eĉ emanus.

Estiĝas efemere  
memeco. Pasis, vere.

\*Huanxisha (silk-lava roĝo): ĉina fiksfoma poemo el du strofoj po 3 versoj de 7 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xa,a (x=senrima)

## Impulso de Dio

—laŭ ĉinesko Kuxiangsi\*

Eksploziga preludo  
tamburis novludo  
La tempo estas aludo  
al dia inkludo  
de nia konkludo

Universa etudo  
Finala apudo  
Postsone forfadas studo  
Okazos eksudo  
Karbona vivkrudo

\*Kuxiangsi (profunda sopiro): ĉina fiksfoma poemo el du samaj strofoj kun 8 versoj de 7,33,8,33,33 laŭ rimaranĝo a,x,a,xa,xa (x=senrima)

## Ĝis, ĝis, Mikrosofto!

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng\*

Libero  
sur tero  
mikrosofta vespero—  
rezignu  
kaj signu  
adiaŭon!  
Ni asignu  
Gnu, Gnu, Gnu!

Prospero,  
kohero,  
ankoraŭ en utero  
Disĉiplu  
kaj kuplu  
komputilon  
Ĝin ni staplu  
plu, plu, plu!

Paĝo ĉe la projekto

